

Claude kaj Andrée GACOND salutas siajn geaŭdantojn, 5.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 februaro

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-007/SRI-1988-007-B-6-Claude-kaj-Andree-GACOND-salutas-siajn-geaudantojn-5.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigas nian salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis vivsignon. Fakte, alvenis leteroj, poŝtkartoj kaj aŭdraportoj el 41 landoj.

En Germanio Okcidenta ni havas multajn geaŭdantojn.

A.- Josef KONDOR en Neuwied skribas pri niaj esperanto-elsendoj: "Viaj programoj, ĉu tiuj de d-ro Arthur BAUR, ĉu tiuj de gesinjoroj GACOND estas tiom valoraj, ke ili meritas plenan rekonon kaj subtenon." Li sendis fotokopiojn de artikoloj, kiuj raportas pri lia agado favore al la helpo al lepruloj aŭ pri liaj aliaj aktivecoj tradukaj kaj esperanto-informaj. Tiujn artikolojn ni sendas al la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, kies Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) rikoltas kaj konservas ĉiujn gazet-eltranĉaĵojn pri esperanto. Koncerne la instruadon de esperanto Josef KONDOR sin demandas, kiun lernolibron konsili al informpetantoj. En venontaj elsendoj ni havos la okazon raporti pri nia maniero agadi en Svislando.

Cl.- Rudolf KOPPEL en Ettlingen petis pliajn sciigojn pri la aŭtomata tradukado, ĉar li volus raporti pri tio en la propra firmao Siemens. En perletera respondo ni donas al li la adreson de d-ro Schubert en Utrecht.

A.- Ni salutas Lothar MAHN en Rottweil.

Cl.- Rokuro MAKABE en Frankfurt am Main, kiu prave konstatas, ke "esperanto estas eble ne tiom disvastiĝinta, kiom oni komence esperis."

A.- Norbert MERKENS en Wuppertal, kiu skribas: "Mi salutas, ke vi per prezentado de gravaj literaturaĵoj donas al ni eblon konatiĝi kun aktualaj esperanto-verkoj. Dankon!" En alia letero Norbert MERKENS diras sian intereson pri la lingvistikaj prelegoj kaj intervjuoj.

Cl.- Ni ankaŭ salutas Werner MINTERT en Delbrück.

A.- Heinrich NISCHWITZ en Bensheim.

Cl.- Walter POPPECK en Oberkirch.

A.- John RICHARD en Düsseldorf skribis: "Mi havas malbonan konsciencon, ke mi tiel longe ne skribis al vi, kvankam preskaŭ regule mi aŭskultas viajn elsendojn. Tre interesis min via disaŭdigo pri ILo. La gazeto "Westfalenpost" intervjuis sinjoron Helmar FRANK kaj publikigis la tekston de la intervjuo, de kio mi sendas al vi ĉi-kune fotokopion. Mi ne ŝatas, ke oni nomas Esperanton Ilo, kiel tion faras Helmar FRANK, ĉar tio nur konfuzas la publikon. Mia opinio sole la komputilcele ŝanĝita Esperanto devus nomiĝi ILo. Estas ja fakto, ke Esperanto fariĝas centjara kaj ne ILo. Mi tre ŝatus aŭdi vian opinion pri tio.

Cl.- Dum la historio de esperanto plurfoje esperantistoj kvazaŭ hontis nomi la lingvon per la vorto Esperanto. Tial ili uzis la formojn mondlingvo, la universala, la internacia aŭ la internacia lingvo aŭ ilo, kiel faras Helmar Frank. Se ili estus konsekvencaj, ili almenaŭ uzus la nomon *Lingvo internacia*, kun la adjektivo post la substantivo, ĉar tiel baptis ĝin d-ro Esperanto en 1887. Povas esti, ke tiu sistema evito de la nomo Esperanto respegulas distanciĝon kun la esperanto-movado kaj kun ties historiaj karakterizaĵoj, kaj interalie kun la filozofia sinteno de la esperantistoj, kiu ricevis la nomon *interna ideo* aŭ kiun oni pli kaj pli nomas *homaranismo*, vidante en Zamenhof pioniron de tiu nova humanismo, kiu rajtas evolui al pli matura analizo de la internaj influoj, kiujn la praktiko de esperanto nepre alportas en nin mem. Helmar FRANK distanciĝas tute certe de la homaranismaj aŭ novhumanismaj sentoj aŭ sentimentoj de la esperantistaro. Li tamen kondukas tute tipe kiel esperantisto, dediĉante grandan energion al kreo de Akademio en San Marino, kies ekzisto mem ĉefe dependas de la apogo financa kaj de la kunlaboro de la esperantistoj. Kaj tiuj, kiuj aktive helpas lin, ne timas uzi la vorton esperanto kaj videble distanciĝas de la emo anstataŭe uzi la vorton ILo. En interlingvistiko la mallongigo ILo ofte havas tre ĝeneralan signifon. Volapük estas ILo, Ido estas ILo, ankaŭ la latina estis ILo, en Unuiĝinta Naciaro kaj ties fakaj organizaĵoj la franca, la angla, la rusa, la hispana, la araba kaj la ĉina estas ILoj, kaj la Lingvo internacia de d-ro Esperanto estas ILo. La nomo ILo estas do tre ĝenerala, nepreciza, la nomo esperanto kontraŭe estas preciza. La uzo de la nomo ILo anstataŭ esperanto tute kreas konfuzojn. Mi partoprenis kibernetikajn kongresojn en Paderborn, kaj pluraj neesperantistoj de tiu ĉi urbo aŭ de ties universitato informiĝis, por scii ĉu fakte ekzistas du internaciaj lingvoj: esperanto kaj ILo. Kiam mi klarigis, ke ILo estas alia nomo por esperanto, ili trovis la aferon stranga kaj ili diris, ke la vorto esperanto estas pli belsona kaj jam konata. Kion respondi? Ke ili pravis. Esperanto ne konkeris vastan publikon, sed en cent jaroj ĝi almenaŭ akiris nomon, kiun bedaŭrinde la esperantistoj daŭre majuskligas en esperanto-tekstoj. Tio pravas, ke por multaj, tiu nomo restas la pseŭdonomo de la aŭtoro. Bedaŭrinde estas, ke por nomi la parolantojn oni donis la preferon al la sufikso *isto*, anstataŭ uzi la sufikson *ano*, kiel faris ekzemple Hector HODLER, bone distingante inter la esperantanoj kaj la esperantistoj. Por li simpla uzanto de la lingvo estas esperantano, dum fakulo estas esperantisto. Ĉar ĉiujn parolantojn oni nomis esperantistoj, oni devis poste imagi poste la neologismon esperantologo por la fakulo. Povas esti, ke kiam la esperantoparolantoj estos pli konsciaj pri tiuj problemoj, ili revenos al pli kongrua vortaro. Denaska esperantisto estas fakte idiotismo. Infano, kiu parolas esperanton en la familio ofte ne kapablas skribi la lingvon. Li tute ne estas isto, sed ano, esperantano. Ĉar tiun esprimon oni ne uzas, oni devas diri esperantoparolanto.

A.- Ni daŭrigu salutante Ludwig ROLL en Günzburg, kiu regule sendas aŭdraportojn.

Cl.- Heinz SCHINDLER kaj lian edzinonon en Schwelm.

A.- Hans SCHÜTT en Hamburg sendis al ni la organon HES-INFORMILO de Hamburga Esperanto-Societo. En ĝi ni konstatis, ke Karl-Heinz HOFFMANN dediĉis tutan klub-vesperon al raporto pri nia Svisa Radio Internacia.

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos tiun salutadon al geaŭdantoj. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!